

83 -a SAT - Kongreso 1 - 6 aŭgusto 2010 Braŝovo - Rumanio

“Ekonomia krizo - Kiam la venonta?”

Sennaciulo



Sennaciulo estas la oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda

<http://www.satesperanto.org/>

marto - aprilo 2010, n-ro 3 -4 (1257 - 1258)

Nia dosiero: vivfino kaj eŭtanazio



novaliĝintoj

35917 ANDRIAMIHAJA Charly Mampionona, Lot II A 119 RB Nanisana MG-101 ANTANANARIVO, Malagasio

35918 BABY GONZALEZ Ronald, Emilio Giro 806 e/ Cuartel y San Gregorio CU-95100 GUANTANAMO, Kubo

35919 CHO Chaoming, 12F2, No. 41, Bijhong Street, TW-80342 KAOHSIUNG, Tajvano

*35920 HANSEN Anna, Poppellunden 26, DK-4270 HONG, Danio

35921 WANG Ju-kwei, 113/18/1/8 Minzu Road, Shuanglian Sec 2, TV-32451 PINGJHEN, Taoyuan County, Tajvano

35922 BEHRA Bernard, 1 chemin de la Transhumance, FR-68290 MASEVAUX, Franci

Nia dosiero por majo- junio: GMO

1. Kio estas GMO?
 2. Superrigardo pri la diversaj utiligoj de GMO-oj
 3. Demandoj kaj problemoj, kiujn starigas GMO-oj
- Findato por sendi tekstojn la 15-a de aprilo

Enhavo

- 2- Bilda Deliraĵoj
- 4- Tri nombroj por elvoki la temon pri la vivfino
- 4- La vivfino, ĉu elekto ?
- 5- Vidpunkto de belgo
- 6- Vidpunkto de sviso
- 6- Atesto pri vivfino
- 7- Vidpunkto de germano
- 8- Digna morto en Usono
- 9- Du iberiaj historioj
- 10- Testamento de Ramón Sampedro
- 12- Vidpunkto de belgino
- 12- Eŭtanazio en Kubo
- 14- Vidpunkto de Ukrainino
- 14- Bilda Deliraĵoj
- 15- Lerni morti "Leteroj al Lucilius"
- 16- La tempo determinas nian vivon
- 16- Pri unu historia vero

17- SAT-kongreso 2010 Braŝovo

18- Bazaj praktikaj informoj

19- SAT-kongreso 2010 Braŝovo Aliĝilo

20- SAT-kongreso 2010 Braŝovo

- 21- Aventurplena aŭtobiografio de Adolf Vesely
- 22- En Parizo, 1956
- 23- Mortis vera anarkiisto
- 24- FINE ...
- 24- Bildstrio de Ed kaj Pris
- 25- Malobeemo palestina
- 26- Vivo en Pollando post socialismo
- 27- Irina Bokava
- 28- Ĉesigita konstruado de la Digo Janba
- 32- Informo el Koreio

- 33- La danco de l'arboj
- 34- Responde al 'Ĉu vi vivas?'
- 34- Imagu foje ...
- 36- La ekskursoj dum SAT kongreso

Sennaciulo

Oficiala organo de S.A.T.

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo:
67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel.
+33.1.47.97.87.05; telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: satesperanto@free.fr.; TTT-paĝoj: <http://www.satesperanto.org.>;
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : satx-s
Plenum-Komitato de SAT :
Prezidanto : Jakvo Schram
Ĝenerala Sekretario : Vinko Markovo
Kasistino : Thérèse Sabatier
Membroj: Guy Cavalier, Stefano Herve Gérard Lieblang, Franjo Leveque-Provost, Arturo Prent. Redakta Komitato - Kreŝo Barkoviĉ, Robin Beto, Vincento Charlot, Tonyo Del Barrio, Jomo Ipfelkofer, Djemil Kessous, Petro Levi, Vinko Markovo, Vito Markovo, Cindy McKee, Gary Mickle, Viola Murasaki, Grazina Opulskiene, Cyril Orsingher, José Maria Salguero (Kani), Serge Sire, Franciska Toubale. Enpaĝigas Jakvo.
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de S.A.T..
Tekstojn vi sendu al: Sennaciulo@telenet.be - aŭ al Jakvo Schram Hof ter Bekestraat 49. BE-2018 Antwerpen

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendadas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 15-a de aprilo 2010.

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas dumonate - Bimestriel. Le directeur de la Publication: Jacques Bannier; Abonnement annuel/jara abono France 55 €.

Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution. N° CPPAP 0510 G 86567

Nekrologo

La 10an de decembro 2009 mortis en Hong (DK)

k-do Erik HANSEN (matr. 35270)

Ni kondolencas al la edzino, nia ĵus novaliĝinta k-dino Anna.

La 29an de decembro 2009 forpasis 89-jara en Sofio

(BG) k-do Dimitar HAĜIEV (matr. 34254)

Li estis regula kontribuanto al Sennaciulo.

La 6an de januaro 2010 mortis en Ĉamberio (FR) 85-

jara k-do Raymond BORE (matr.33322)

Li estis grava aktivulo sur la kampo de listigado de ZEO-j.

Komence de aŭgusto 2009 forlasis nin Eŭgen Schneider (34825)

Li estis batalanto pro la ideoj pri paco kaj Esperanto.

La vivfino, ĉu elekto ?

Antaŭparolo pri Vivfino - Eŭtanazio

Ĉu la vivfino estas elekto ? Jes kaj ne, laŭ tio, ĉu oni loĝas en malriĉa aŭ riĉa landoj, aŭ ĉu oni loĝas en landoj, kiuj militas.

En la landoj, kiuj militas, la vivfinoj altruditaj pro la milito ĉesos kiam estos la paco.

En la malriĉaj landoj, por la granda plimulto de la loĝantaro la vivkondiĉoj ne ebligas la elekton de la vivfino. Kaj la vivkondiĉoj estas altruditaj de la riĉaj landoj, kiuj ekspluatas la malriĉajn landojn.

En la riĉaj landoj, la vivfino estas ĉiam elekto, krom akcidento. Eĉ tiu, kiu diras, ke ĝi ne elektas. Ne elekti estas ankaŭ elekto. Tamen la vivfino estas ĉiam individua elekto. Sed, por ke tiu elekto estu respektota necesas leĝo. Leĝo, kiu samtempe protektas tiun, kiu elektis la rifuzon de iuj suferoj, kaj tiun, kiu, pro religiaj, filozofiaj, aŭ aliaj kialoj, konsentos suferi. Tamen por ke la elekto rifuzi iujn suferojn ne estu kontestota, necesas redakti "Testamenton de vivfino", kiu indikas kaj precizigas tiun elekton. Belgio, Luksemburgio, Nederlando havas leĝon, kaj

Svislando ebligas la memmortighelpon.

Foje, en la riĉaj landoj, eble necesas demandi sin: Ĉu normalas kaj moralas vivteni dum kelkaj pliaj tagoj nekuraceblan malsanulon, kiu multe suferas kaj volas morti, kaj ĉiel mortos, kiam miloj da infanoj de la Tria Mondo, kiuj volus vivi, tage mortas pro la malsato, la malsano, ?

Kelkaj ciferoj:

En Francio, 1 000 € estas le meza proksimuma kosto de hospitaltago.

Laŭ la ne-registara organizo, "Ago Kontraŭ la Malsato", 38 € savas infanon de la misnutrado dank' al intensa kuracado dum 4 semajnoj.

Ni pripensu, tiu dosiero povos helpi la pensadon.

Colette Weiss kaj André Weiss

SAT

Tri nombroj por elvoki la temon pri la vivfino

100.

100 % estas la procento de la loĝantaro koncernata pri la vivfino. Tial ridinde estas, por nigri la agadon, kiun daŭrigas la Asocio por la Rajto je Digna Morto (ADMD) ekde 1980, diri ke la membroj de la Asocio postulas mortorajton. Bedaŭrinde, la morto trudiĝas al ĉiu el inter ni, kia ajn estos nia antaŭtimo, kiam ĝi alproksimiĝos. ADMD ne petas elekton inter la vivo kaj la morto, sed petas elekton inter du manieroj por morti: la libere elektita morto kaj la ne-elektita morto.

86,3.

86,3 % estas la procento da gefrancoj, kiuj estas favoraj al eŭtanazio (opinisonde el majo2009).

0.

0 estas la kvanto da minutoj, kiun la franca Parlamento pasis pri la temo de la vivfino dum la debato pri la revizio de bioetikaj leĝoj. La vivkomenco estis debatita, ne la vivfino.

Legante tiujn tri nombrojn, la 47 300 aliĝintoj de ADMD, kaj, kun ili, la ampleksa plimulto de niaj samcivitanoj sin demandas: kial la elementa rajto por regi sian vivfinon,

